

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:

József Németh (red.)

Mireille Grosjean

Luigia Oberrauch Madella

Ahmad Reza Mamduhi

Rob Moerbeek

Kunlaborantoj

de la aktuala numero:

Palma Csiszár-Salomon

Karmen Delač-Petković

Sylvia Hämäläinen

Gong Xiaofeng (Arko)

Mireille Grosjean

Vicente Manzano-Arrondo

Monika Molnar


Carlos Oliveira

Germain Pirlot

Martin Ptasinski

Spomenka Štimec

Zlatko Tišljar



ENHAVO

Enkonduko (Mireille GROSJEAN)	3
Mireille GROSJEAN: <i>Pri VEKI ĝenerale</i>	4
<i>Miaj impresoj pri VEKI</i> (Carlos OLIVEIRA, Sylvia HÄMÄLÄINEN)	7
Vicente MANZANO-ARRONDO: <i>Esperanta Strategio en Universitatoj</i>	8
<i>Instruspertoj (Notoj okaze de vidbabelejo libera)</i> (M.G.)	16
<i>Ideoj naskiĝas per diskutoj: oni ne povas esti genia sola</i> (M.G.)	17
<i>Valoro de kantado kadre de instruado</i>	18
Monika MOLNAR: <i>Kantoj kaj Kajto en la instruado</i> [...]	20
Biografioj de niaj novaj Honoraj Membroj: Germain Pirlot, Zlatko Tišljarić	23
<i>Esperanto en maŝin-ŝipkonstrua lernejo en Rijeka</i> (DELAČ-PETKOVIĆ, ŠTIMEC) ..	28
<i>Babiligilo</i> (Mireille GROSJEAN)	31
Anoncoj	31
El la landoj kaj sekcioj (AR, CN, DE, HU)	32
Informoj pri ILEI, redakciaj informoj	37

ESTRARO DE LA LIGO

- Prezidanto:** Mireille GROSJEAN „Mirejo”, Grand-rue 9, cp 9, CH-2416 Les Brenets, Svislando. <mirejo.mireille@gmail.com>. Tel. hejma (+41) 32 932 18 88, portebla (+41) 79 69 709 66. Kunordiganto de la estrara laboro. Eksteraj rilatoj (UNESKO, FIPLV kaj aliaj). Informado pri la Ligo. Observanto de ILEI en la estraro de UEA kaj Komitatano A ĉe UEA. Eldonado de la du revuoj de ILEI.
- Vicprezidanto:** Ivan COLLING, DEPAC/UFPR, Ed. Dom Pedro I, Rua Gal. Carneiro, 560, Primeiro. Andar, Centro, BR-80060-150, Curitiba, PR, Brazilo. <iecolling@yahoo.com.br>. Eldonado de la Manlibro pri Instruado de Esperanto
- Sekretario:** Elena NADIKOVA, ul. Kadikova, 24-41, RU-428037 Ĉeboksari, Rusio, Tel. fiksa: (+7) 8352-648531, portebla: (+7) 919-670-25-34. <lena_espero@mail.ru>.
- Estrarano pri financaj aferoj:** William HARRIS „Vilĉjo”, 4 Edgecomb Ct, Portland ME 04013, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Tel. hejma (+ 510) 653 0998.
- Vic-prizorganto de financaj aferoj:** Karine ARAKELJAN, 33 Khandjian Str., Apt. 4, AM-0010 Erevan, Armenio, Tel. poŝ.: (+374) 055-27-99-06. <karinko_arm@mail.ru>
- Estrarano:** JUNG Yuro „Unika”, 101, Bonuru-Musashi, 9-11, Asahicyou 3, Kawagoe, Saitama JP-3501126, Japanio. Tel. poŝ.: (+81) 70-5569-6771. <yurjun@st.amu.edu.pl>. Reta komunikado, kongresaj aferoj, TEJO.
- Estrarano:** Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. Tel. hejma (+381) 32 371053. <radojica.petrovic.rs@gmail.com>. Universitata agado, Eŭropa komisiono de UEA, AEDE.

Scienca Komitato

Prezidanto: Humphrey Tonkin,

Usono, University of Hartford;

AdE¹

Membroj:

Duncan Charters, Usono, Principia College, Elsah

Renato Corsetti, Britio/Italio, Università degli Studi di Roma „La Sapienza”; AdE¹

Probal Dasgupta, Barato, emerita profesoro de LRU, Indian Statistical Institute, Kolkata; AdE¹

Alozas Gudavičius, Litovio, Šiaulių universitetas

Boris Kolker, Usono; AdE¹

Iona Koutny, Pollando/ Hungario, Uniwersytet im. Adama Mickiewicza w Poznaniu

Stefan MacGill, Nov-Zelando/ Hungario

Aleksandr Melnikov, Rusio, Академия Сельскохозяйственного Машиностроения, AdE¹

Radojica Petrović, Serbio, Univerzitet u Kragujevcu

Balázs Wacha, Hungario, MTA Nyelvtudományi Intézet

¹ AdE – Akademio de Esperanto

Sur la titolpaĝo: Kantoj en la instruado (vd. la artikolon de Monika Molnar sur p. 20)

Sur la dorskovrilo: podiaj diskutoj kun la redaktoro de *Juna Amiko* kaj tiu de IPR dum VEKI

Enkonduko

Karaj legantoj,

Dum nia Virtuala Esperanto-Konferenco VEKI ni rilatis fore, per bildo kaj voĉo. Nun ni rilatas denove fore, per papera aŭ reta revuo, kiu alportas al vi novaĵojn pri la vivo de la Ligo. Kompreneble ĉi tiu numero informos vin pri la gravaj momentoj de nia Konferenco. VEKI altiris 350 personojn, do la duoblon de la kutima kongresanaro. Konsekvence ni povas esperi, ke duobliĝos ankaŭ nia membro-nombro Tio estus tre bonvena evoluo, kiu efikus pozitive sur nia financa situacio. Niaj du Facebook-paĝoj havas po proks. 340 membrojn. Nia Youtube-kanalo atingas preskaŭ 200 membrojn kaj tiu nombro certe kreskos, kiam aperos tie la registraĵoj de VEKI. Nia freŝa Telegram-grupo jam superas 100 membrojn. Do, kiel vi povas konstati, ni komunikas per diversaj rimedoj.

Ni devas kreskigi kaj efikigi komunikadon pri nia revuo *Juna Amiko*, ĉar la valorega laboro de la kontribuantoj kaj regulaj rubrikestroj devas atingi pli da legantoj. Tio alportos ankaŭ bezonatan kontribuon al niaj financoj.

Do ni legu, ni informu, ni varbu, ni abonu, ni subtenu la Ligon!

Mi deziras al vi agrablan kaj informan momenton en la legado de IPR.

Mireille GROSJEAN

Prez de ILEI


Pri VEKI ĝenerale

de Mireille GROSJEAN, prezidanto de ILEI

La nomo VEKI estas formulo proponita de Stefan MacGill.

Laŭ SO Jinsu: vekki kion? Kion ni volas vekki? La homaro devas vekkiĝi. El la orientazia filozofio: Lumigu la mallumon en via koro!

Mi persone atingas la finon de VEKI kun sufiĉe sama sento kiel fine de iu kongreso kun alvojaĝado. Svarmis la renkontiĝoj, abundis la prezentaĵoj, la prelegoj, mi eksciis multon.



Ne estis paralelaj programeroj, estis nur unu prelegovojo. Liberaj vidbabilejoj ekzistis paralele. La programo okupis 12 horojn tage dum 7 tagoj.

Nur du prelegoj estis re-elsenditaj, du horoj. Do la programo daŭre alportis ion novan.

Mankis la nacia vespero, pro foresto de la nocio de vespero, kiam oni kunvenas tutmonde virtuale. Mankis iu gastiganta lando, ni estis gastoj de la Tero. Esprimante tion la prezidanto prezentis *Planedan pripenson*.

Ankaŭ la Internacia Vespero mankis. Tamen ni povis aŭdi diversajn artistojn, kiuj faris disajn Internaciajn Artajn Momentojn. Elkoran dankon al **ĉiuj artistoj**, kiuj kontribuis al buntigo de nia Konferenco. Oni povis rimarki, ke kelkaj kantis vive (2), aliaj registris hejme koncerton por nia konferenco (5), aliaj donis ligan al enretigitaj kanzonoj (3). Entute ni havis 10 koncertojn.

Komento post la evento: unu sufiĉas.

„Ĉi-semajne mi unuafoje partoprenas en kongreso de ILEI, kaj ĝi estas la plej bona fakkongreso, en kiu mi partoprenis ĝis nun. Mi neniam imagis, ke la programo estos tiom altnivela! Do mi gratulas la tutan teamon de ILEI.”

Ni parolu pri statistikoj

En la 15-a de julio aliĝis 180 personoj.

En la 16-a de julio la nombro de aliĝintoj superis 200 el 47 landoj.

Ĝis la 19-a de julio eblis aliĝi senpage.


En la 25-a de julio matene aliĝis 338 personoj el 58 landoj kaj antaŭ la komenco de la Konferenco estis 343 el 60 landoj. Dum la Konferenco ni atingis 349 partoprenantojn.

La plej alta nombro de ĉeestantoj dum VEKI estis 300 aŭskultantoj kaj tio estis dum la enkonduka prelego de Profesoro Davide Astori la unuan tagon.

La plej alta nombro de partoprenantoj estis el Koreio, sekvis Brazilo, Francio, Pollando.

El la **Estraro de ILEI** transprenis la organizadon de unu Tago: Elena Nadikova (Tago de la Lingvoj kaj Gastronomio Rondo), Ivan Colling (Tago de Universitatoj), Unika kontribuis. Elisabeth Le Dru prizorgis la Tagon de Pedagogio, sen esti estrarano. Koran dankon al ĉiuj!

Kunlaboro kun la slovakaj firmaoj E@I

Ĝi estas konata en nia Movado, ĝi estas eldonejo, ĝi lanĉis lernu.net. Jen **E@I: Edukado @ Interreto**. Mi laboris ĉefe kun Dorota. Ŝi efike kaj klare priskribis tion, kion ŝi bezonis de mi. Mi devis el mia imago, inventemo kaj ideoj liveri uzeblajn donaĵojn, do iel traduki miajn pensojn al ŝiaj teknikaj bezonoj... Inter ŝiaj frazoj ofte venis mia nomo Mirejo! Pro tio komence de nia kunlaboro mi devis memori pri mia patrino, kiam ŝi admonis min: Mireille! Do mi sentis severecon kaj preskaŭ riproĉon ĉe Dorota. Kompreneble estas aĝodiferenco. Kaj plie estas kultura diferenco. Tra la horoj, dekoj da horoj de preparlaboroj mi povis konstati, ke tio apartenas al ŝia parolmaniero kaj uzante mian nomon ŝi ne admonas min. Alia interesa aspekto estis la grafikaĵo sur la programo, kiun ŝi nomas nigra triangulo kaj kiun mi nomas sago (*vidu la sagon dekstre*)... 

Okaze de la enkonduka prelego Profesoro Astori nomis ŝin „anĝelo”. Mi tute konsentas: Dorota estas anĝelo. Mi devas ankoraŭ aldoni, ke ŝi neniam nervozigis, ŝia tono estis ĉiam la sama, trankvila, firma, efika, eĉ kiam mi ion ne sciis, kiam mi ion ne komprenis, kiam mi ion forgesis, kiam mi ion fuŝis, ĉiam ŝi rezistis al nervozigo. Gratulojn! Kompreneble

ankaŭ la kontaktoj kun ĉiuj aliaj teamanoj estis tre agrablaj. Dankon Sonja, Matthieu, Kristof....

Kiel mi uzis tiun eventon por disvastigi informojn pri ĝi kaj pri Esperanto ĝenerale en mia regiono.

Tutmonda evento lanĉita de vilaĝo en neŭsatela Ĵuraso, tio ebligis al mi aliri al la amaskomunikiloj. Venis la loka gazeto *Arc Info*, venis la loka radio *Radio Neuchâtel* kaj la loka televido *Canal Alpha*, kaj venis la ŝtata franclingva radio kaj la ŝtata franclingva televido. Do la rikolto estis abunda. Povis okazi intervjuoj pri Eo per la Reto kun Duncan Charters kaj Ivan Colling en la franca lingvo laŭ la deziro de la ĵurnalistoj; bonega impresio.

Pri la laboro de la Komitato dum VEKI

Nun mi devas gratuli du personojn, du virojn, kiuj enorme kontribuis kaj kontribuas al la dissemado de Esperanto kaj al ĝia instruado, kaj kiujn la Komitato de ILEI elektis Honoraj Membroj. La komitatkunsido ne havis kvorumon; do reta voĉdono estis samtage lanĉita pri tiu elekto. Jam vespere la nombro de JESoj superis 25, do la kvorumo estis atingita rete. Ni gratulu Zlatko Tisljar kaj Germain Pirlot. Pri ili oni povas legi en la Panteono de Edukado.net, parte citita sur paĝoj 23-27 de tiu ĉi numero de IPR.

Fruktoj

Diversaj programeroj alportis novajn sciojn, novajn analizojn, novajn ideojn por la postaj vivo kaj agado de ILEI. Lastmomente la teknika teamo proponis vidbabilejojn meze de la paŭzoj kaj la organizanto devis rapide, rapidege, trovi nomojn por ili.

En la dua Tago „Strukturoj”. Kiuj strukturoj por kiuj celoj?

En la dua Tago „Komitato”. Kiu estraro por ILEI por 2021-2024?

En la tria Tago „Lingvoj”. Ĉu poliglotoj havas avantaĝojn?

En la kvara Tago „Pri Universitatoj”. Kiel starigi Eo-kursojn/klubojn en universitatoj?

En la kvina Tago „Pri la Ligo”. Kia Esperanto-instruista Trejnado (EIT)?

En la sesa Tago „Pri la Pedagogio”. Pri instruspertoj.

En la sepa Tago „Kun AMO-seminario”. Kiajn dezirindajn trajtojn la esperantisteco de intruisto alportas al la lernejo?

Fine de la semajno kelkaj personoj povas atesti, ke la enhavo de tiuj liberaj vidbabilejoj estis foje same instruaj kiel la prelegoj. Do tio tute samas kiel en kutimaj ĉeestaj kongresoj, kie ankaŭ la koridoraj diskutoj estas grava parto de la kongreso.

Grandan dankon al ĉiuj, kiuj kontribuis al tiu premiereca evento!

Laŭ frapfrazo de SO Jinsu: per VEKI ni vekigu!!

Miaj impresoj pri VEKI

Mi loĝas en Norda Ĵuazejro (Brazilo), laboranta kun brajla sistemo kaj signolingvo en ŝtata lernejo por adoleskantoj kaj plenkreskuloj ekde 2002. Mi eksciis pri Esperanto en 2003, sed nur en la jaro 2015 mi decidis lerni la interacian lingvon. Dum la sama jaro mi trovis geamikojn kaj fondis Esperanto-Klubon Kariri. La klubo proponis bazajn kursojn ĝis la fino de 2019, tiel la Esperanta movado estas disvastigita en la regiono Kariri formita el 33 urbetoj.

Por plibonigi mian komprenon de strategioj kaj pedagogioj rilate al instruado de Esperanto, mi decidis partopreni en VEKI - certe ne sciante, kiajn surprizojn mi alfrontos. Ĝi estis vojaĝo tra la tuta mondo, sen foriri de mia hejmo, antaŭ komputilo kaj poŝtelefona ekranoj. Mi streĉis mian (sekur)zonon kaj la aviadilo ekveturis al Esperantujo.



„Mi sidas hejme sola”, parolis la prezidanto de ILEI, sinjorino Mireille Grosjean, dum la inaŭgura malferma parolado, en la pandemia periodo, ŝi estis en sia hejma biblioteko, antaŭ filma aparato, sen fizika kontakto kun iu ajn, la nova norm(al)o.



En la konferenco mi dancis, kantis, lernis nociojn pri teknikoj de la japana jogo, la ĉina lingvo, la lingvoj kaj kulturo de Barato inter aliaj prelegoj... Mia menso neniam plu estos la sama kaj la vojaĝo pli kaj pli ekscitis, tamen la flugo trairis la nokton. La turneo komencis instigi min per la diverseco de temoj kaj personecoj, kiuj plej engaĝis sin por kundividi siajn spertojn. Kiel artefarita lingvo povus ampleksi kaj kompleksecon kaj simplecon, kaj evolui tiel multe? Amira Chun respondis al mi per sia bela Esperanta kanto, mi ne volis, ke ŝi ĉesigu la kantadon... Poste mi memoris pri Zamenhof (1887): „Por ke lingvo estu internacia, ne sufiĉas nomi ĝin tia.” La vojaĝo kondukis min al Kubo kun la prelego ‘Interkulturaj valoroj de Esperanto kaj ĝia influo en la instruado de fremdaj lingvoj’, kaj ankoraŭ mergante min en la pedagogion per paroloj de Katalin Kovats, Stano Marček kaj Mireille Grosjean.

La konferenco finiĝis. La taglibro memorigos ĉion okazintan dum la vojaĝo. Mireille kaj centoj da aliaj esperantistoj en sia hejmo daŭre disvastigas ĉi tiun plej interesan neŭtralan internacian lingvon. Ĝis la venontjara Konferenco!

Carlos OLIVEIRA

Mi volas danki vin pro la gvidado de VEKI kaj pro viaj programeroj. Speciale min trafis la Planeda pensado, kiun vi prezentis en la ĝardeno kun pepadoj de birdoj kaj sonadoj de bovinaj sonoriloj. Eĉ iu fluganta insekto volis montri sin sur la ekrano. Almenaŭ en via ĝardeno ĉio ŝajnas esti en bona stato. Vi listigis agojn, kiujn ni individue povas fari por la bono de la planedo. Multon mi jam faras, sed certe povas pli bone fari. Dankon, ke vi igis min pensadi.

Sylvia HÄMÄLÄINEN

Fakaj materialoj el VEKI

Interlingvistiko kaj Esperanto en Universitatoj

Esperanta Strategio en Universitatoj

de Vicente MANZANO-ARRONDO (Viko)

Resumo. La kutima maniero pensi pri la rilato inter Esperanto kaj Universitato konsistas el aro da kursoj kaj diskursoj pri la lingvo. Samtempe rimarkeblas diversaj klopodoj Esperantigi la sciencon, la teknikon kaj la Superan Edukadon. Tamen tiuj klopodoj plejparte havas malforton kaj algluatas al antaŭa sukcesa historio de la esperantista movado. Ĉi tiu dokumento celas enmeti ian psikologian klarigaron en la komprenon de la relative malgranda sukceso inter ambaŭ eroj, Esperanto kaj Universitato. Pro tio, la unua parto priskribas kelkajn detalojn de la nuntempa homa konduto. La dua substrekas prikondutajn barilojn de la Universitato, kiel institucio kaj kiel individuaro. Kaj la tria klopodas aranĝi principojn por la starigo de konkreta strategio, bazitaj sur elekto de realaj spertoj. La kerno de ĉi tiu partopreno estas elstarigi la bezonon montri Esperanton kiel universitatilon, sen reklami ĝin.

Ŝlosilvortoj: Strategioj en universitato, universitata konduto, homa konduto, strategiaj principoj.

1. Enkonduko

Universitataj esperantistoj facile povas konsenti pri la aserto, ke Esperanto ĝenerale ne videblas en universitatoj malgraŭ la klopodoj de multaj aktivuloj. En la celo stimuli kumpensandon pri la afero, kiu aldoniĝas al la historiaj paŝoj pri la sama temo, mi pritraktos kvar kampojn: (1) kelkaj gravaj karakteroj de la homa konduto, ĉefe tiuj kiuj bremsas la disvastigon de Esperanto; (2) kial la bremsiloj akiras pli da forto en la universitata medio; (3) du vojoj klopodi sukcesigi Esperanton en la universitato, kiujn mi nomas rekta kaj nereкта vojoj; kaj (4) kelkaj principoj por la konkretigo de universitata strategio.

2. Pri la tempo en la homa konduto¹

La aserto „mi ne havas tempon” estas sufiĉe kutima, sed la sento ne havi tempon estas relative nova en nia historio kaj aperis ĉefe antaŭ malmulte da jardekoj, ĉefe de kvar flankoj. La unua estas la tempo de la laboro. La antaŭa tempo de laboro estis preskaŭ 100% *kerna tempo*, nome horoj dediĉitaj al la laboraj taskoj. Nuntempe la *ĉirkaŭanta tempo* povas esti pli elstara. Tiel, oni devas alkitimiĝi al kvar kondutoj: (1) dediĉi horojn por plibonigi la scion pri la laboro en tro ŝanĝiĝema merkata etoso, kiu postulas sinsekvajn konkurecon de laboristoj; (2) translokiĝi ofte laŭ la bezonoj de la posteno; (3) akcepti, ke oni perdos la nunan postenon kaj havos devigon okupiĝi por serĉi alian, kaj poste alian kaj plu; (4) esti iranta kaj revenanta, ĉar la lokoj, kie situas la laborejo kaj la restadejo, emas esti malproksimaj. Rezulte laboristo, kiu devas esti disponebla ĉiam, ĉiel kaj ĉie, ne havas tempon.

La dua flanko temas pri la *libera tempo*, plena de ŝajne senfina kvanto da oportunoj merkte ofertataj. Bona ekzemplo estas la sociaj retoj. Normala ordinara nuntempa homo estas tiu, kiu ĉiutage elspezas horojn okupata pri la sociaj retoj, en kiuj partoprenas, plej ofte eĉ plendante pri tia tasko. Al tio aldoniĝas, ke homoj facile sklaviĝas pri rutinoj, kiuj solvas la liberan tempon, pri kio oni malfacile akceptas ŝanĝojn.

La libera kaj labora tempoj nuntempe forte realiĝas per teknikajtoj. Oni bezonas tempon por lerni, kiel funkcias la lasta versio de pluraj softvaroj kaj por ŝanĝi la malnovajn aŭ ĵus malfunkciiĝintajn aparatojn.

¹Baze la enhavo de ĉi tiu sekcio devenas de spertoj kaj pripensoj. Tamen, parte ĝi devenas de diskutoj en la grupo Universitato kaj Socia Engaĝiĝo kaj de la libroj de Riechmann (2003) kaj Novo (2010).

Oni eniras en senfinan vojon por ĝisdatigi sian scion pri la malfacile mezurebla nombro da teknikaĵoj, kiuj ŝajnas ĉie ĉeesti.

Esperanta strategio en Universitatoj



Kvare kaj fine okazas, ke se oni havus tempon, oni uzus ĝin en *utila tasko*. La ideologio kapitalismo tiom sukcese eniris en nian kapon, ke mense oni akceptis, ke meritas penon nur la okupiĝoj, kiuj estas fruktedonaj (Ordine, 2013). La travivo de la homaro bezonas, ke la homoj daŭre okupiĝu pri aferoj, kiuj donas kaj rapidan kaj videblan profiton, kiel zorgi pri familianoj aŭ ĝui neatendatan sunleviĝon tra la fenestro de la dormoĉambro. Malgraŭ tia realo, kutime oni asertos, ke okupiĝo pri ne klare fruktedonaj taskoj estas stultaĵo.

Ĉu lerni Esperanton ŝajnas fruktedona konduto, kiu faciligos la vivon en la teknika medio, helpos trovi aŭ plibonigi la postenojn aŭ indos kiel ĝuo en neekzistanta libera tempo?

3. Kio pri la universitato?²

Pluraj fakuloj konsentas priskribi la edukadan sistemon kiel fabrikon, kiu prenas diversecon kaj produktas homogenecon, sekvante la bankan modelon (Freire, 1970). Ekde la infaneco, kiam iu ajn ne kapablas aŭ ne volas adaptiĝi al la edukada sistemo, li aŭ ŝi estas forpelata. La ceteraj sukcesos. La

² La enhavo de ĉi tiu sekcio troviĝas ĉefe en Manzano-Arrondo (2015, 2017a,b).

sukcesuloj estas tiaj, kiuj lernis kiel adaptiĝi, nome kiel scii tion, kion la sistemo deziras, kaj doni ĝin. Alivorte kaj iom akre, nur la obeemaj lernantoj finfine eniros en la universitaton. Certe la edukada fabriko eraras tiel, ke homoj neobeemaj, eĉ revoluciemaj, povas travivi la sistemon. Sed tio maloftiĝas kurson post kurso.

Nur parto el la travivintaro iĝos profesoroj. Ili atingis tian altnivelan kapablon obei, ke ili obeas antaŭ ol ricevi ordonon. Profesoroj kaj similaj universitatoj havas potenchan antenon por la tasko antaŭvidi tion, kio okazos monatojn aŭ jarojn poste pri nova koncepto, modo aŭ sukcesa vojo atingi projektojn aŭ publikigi sciencajn artikolojn. Kaj ili klopodas kiel eble plej rapide kaj sukcese adaptiĝi al tio.

Malgraŭ la simpligo, tia vidpunkto helpas nin kompreni, kial disvastigi Esperanton estas pli malfacila tasko en la universitata medio ol ekstere. Universitatoj ne nur estas normalaj homoj, kiuj ne havas tempon kaj malsanas pri la utileco, sed ili estas ankaŭ tiom adaptiĝemaj, ke Esperanto ne atingas videblon.

4. Klopodante solvi la aferon 1. La rekta vojo³

En tian medion eniras esperantistoj, kiuj klopodas montri la taŭgecon de Esperanto kiel universitatilo. Kion ni faras? Kutime ni realigas du taskojn: kursojn kaj diskursojn.

4.1. Pri kursoj

Kelkaj paĝoj de la historio montras, ke plurfoje la alvokoj lerni Esperanton estis tiom sukcesaj, ke oni bezonis eĉ placojn por la alveno de centoj (eĉ miloj) da lernantoj. Sed tio ne okazas nun.

Nuntempe Esperantaj kursoj suferas oftajn problemojn: aŭ la alvoko trafas neniu studenton aŭ la kvanto da ĉeestantoj sufiĉe malkreskas, tiom ke kelkfoje la kurso finiĝas ĉar neniu restas. Tia estas la informoj, kiuj trafas min de pluraj landoj.

La novaĵoj, kiuj alvenas de Ĉinio aŭ Suda Koreio, ŝajnas iom malsamaj, klare pli sukcesaj, kvankam la malaltiĝo de la nombro ŝajnas kutima sperto. Do, la universitata sukceso de Esperanto malfacile realiĝos per Esperantaj kursoj. Temas pri bezonata tasko, sed klare ne sufiĉa.

³Origina priskribo de la duopo rekta (aŭ centra) kaj nereakta (aŭ periferia) vojoj estas en la libro de Petty kaj Cacioppo (1987).

4.2. Pri diskursoj

Malfacile oni povas kontesti la bonan argumentaron lerni kaj uzi Esperanton. Sed bedaŭrinde pravi tute ne sufiĉas⁴. Kvankam kialoj gravas, la kutima konduto de homoj ne baziĝas sur kialoj sed emocioj. Eĉ dum mia sperto pri esplorado, kelkfoje mi trovis neatenditan reason de la intervjuato, kiu konfesis pli-malpli laŭlitere „mi tiom suferis (mense, mone, energie, tempe) lernante la anglan, ke mi ne deziras la sukceson de Esperanto; tio signifus, ke mia sufero estis por nenio”.

5. Klopodante solvi la aferon 2. La nereкта vojo

Anstataŭ teoriumi pri tio kio estas la nereкта vojo, permesu al mi klarigi pri ĝi per kvar ekzemploj de realaj spertoj, kiuj okazis en mia universitato.

1. Mi instruas pri kvalita metodologio per metodo, kies principo estas, ke studentoj lernu samtempe reale esplorante konkretan temon. Antaŭ du kursoj mi proponis la lingvan justecon kiel komunan temon. Esplorante pri tio, studentoj ankaŭ renkontis Esperanton. Do pluraj grupetoj ekokupiĝis esplori pri tiu stranga lingva projekto tiom fiaskinta. Rezulte, ili aranĝis blogon kaj studis pri pluraj flankoj el la lingvo: gramatiko, historio, interna ideo, muziko, personeco de la esperantisto, monda komunumo, luktado por la lingva justeco ktp. Ses el ili eĉ komencis lerni Esperanton. Mi kalkulas, ke pli-malpli 350 homoj estis tuŝitaj de la esploroj fare de studentoj. Mi ne reklamis pri Esperanto. La studentoj renkontis la lingvon kaj sentis alvokon. Mi nur zorgis facililgi tian renkontiĝon, por ke ĝi estu natura.

2. Antaŭ du jaroj mia universitato akceptis projekton, kies celo estas la videbligo de Afriko. Ĝi konsistis el kvin sesioj pri kvin landoj el Afriko, kies partoprenantoj parolis pri la landa lingva politiko. Adjévi Adjé (Togolando), Bernard Gnancadja (Benino), Byelongo Elisée (Sud-Afriko), Drissa Flayoro (Malio) kaj Joel Muhire (D.R. Kongo) partoprenis per ĉapitro kaj video. La materialoj elŝuteblas el <http://institucionales.us.es/marco/indekso.htm>. La afiŝo informis „Lingvo de la seminario: hispana. Lingvo kun Afriko: Esperanto per samtempa tradukado”. La videoj estis subtitolitaj hispane, kaj ni aranĝis dulingvan libron. Dum la sesioj la publiko renkontis Esperanton, sed neniu reklamis pri ĝi. Kiel estis antaŭvideble, kelkaj partoprenantoj el la publiko demandis pri tiu lingvo tiom flue parolata de la afrikanoj. Unu el la rezultoj: post la seminario tri profesoroj pri filologio kaj profesorino pri antropologio proponis realigi universitatan grupon pri lingva justeco kaj

⁴Video pri ĉi tiu temo en <https://youtu.be/FIs4WjDRsDs>

apogi Esperanton. La kolegoj pri germana, angla kaj hispana filologioj parolis pri Esperanto en siaj klasoj, kaj ekde tiam mi estas plurfoje vokita eniri en iliajn klasĉambrojn kaj prelegeti pri lingva subpremado, lingva justeco kaj Esperanto. Ĉi tiun jaron ses studentoj aranĝis kurson pri la lingvo.

3. En alia apogata projekto pri Afriko, la universitato petis min skribi alvokon por la celo allogi studentojn iĝi volontuloj. En ĝi estis priskribo pri la projekto (jam 6 afrikaj landoj danke al Fafah el Madagaskaro), kie oni povas legi „La lingvo de la teamo, per kiu oni parolas kun Afriko, estas Esperanto. Oni pozitive valorigos, ke voluntulo regu tiun lingvon”. Kvar studentoj skribis pli-malpli pri la sama reago: „Mi deziregas partopreni en la projekto. Mi havas pasion kaj fakas pri la enhavo. Sed mi timas esti rifuzita, ĉar mi scipovas kelkajn lingvojn, sed ne Esperanton. Ĉu mi povas partopreni malgraŭ tia manko? Ĉu realigeblas lerni ĝin sufiĉe por la celo esti akceptita?” Ni jam spertis la unuan virtualan renkontiĝon, kaj mi interpretis. Ĉu volontuloj lernos Esperanton? Mi ne scias. Ĉu ili havas pozitivan sintenon? Tute klare jes.

4. Kune kun la korea esperantistino JUNG Yuro [ĉon juro] kaj la Fondaĵo pri Esplorado de la Universitato de Seviljo, ni starigis la entreprenon Civiencia, kies socia celo estas la demokratiigo de la scienco. Civiencia estas entrepreno registrita en Hispanio, kie ĝi atingis la oficialan kvaliton de strategia entrepreno por la lando. Nia labora lingvo estas Esperanto. Kiam ni subskribas kontrakton kun alia organizaĵo, la reprezentanto vidas dulingvan dokumenton. La aktoj de la kunvenoj estas dulingvaj. Ni realigis malferman seminarion, kies titolo estas „Post la kronviruso: kian mondon ni volas” kaj kies celo estas helpi pensi. Ĝi situas en entreprena projekto, kies nomo estas Esperanta. Kiam la prelegantoj eniras kaj legas la klarigojn, ili malkovras la gravecon de la lingvo. Sed ni neniam prelegas pri la lingvo, nek klopodas konvinki iun ajn. La entrepreno ofertas ankaŭ praktikojn al studentoj de pluraj fakultatoj. En la alvoko oni povas legi „Civiencia havas Esperanton kiel laboran lingvon. Oni pozitive taksos vian scion pri la lingvo, scion kiu ne estas deviga”. Kutime studentoj legas, ke oni petas scipovon pri la angla. Estas la unua fojo, ke Esperanto aperas en mia universitato kiel pozitiva ero de la vivresumo de kandidatoj. La ofertoj aperos ekde septembro. En decembro ni havos informon, kiu permesos nin konkludi pri la sukceso aŭ fiasko de la klopodo.

Konklude, en ĉiuj spertoj mallonge priskribitaj la rolo de Esperanto similas: estas lingvo ĉeestanta nature en projektoj kaj spertoj. La reago de la trovintoj estas surprizo. Sed la sinteno, kiun ili trovas en la respondeculoj de

la spertoj, estas tia, ke la uzo de Esperanto ŝajnas la plej natura decido el la mondo. Ili renkontis lingvon kaj ĝian valoron samtempe, sperte ligitajn. Poste realiĝas specifaj paroladoj pri Esperanto, kiuj devenas de la scivolemantoj.

Ĉi tiu nereкта vojo ne malvalorigas la rektan. Ambaŭ bezonatas. Sed mia labora hipotezo estas, ke la nereкта havas pli da sukceso.

6. Principaro

Iom pripensinte rilate al la nuntempa universitato, kies ege adaptiĝemaj membroj ne havas tempon, mi klopodis konkludi pri la malforto de la rekta vojo kaj la indo provi la nerektan. Rilate al tiuj spertoj, mi kuraĝas proponi kelkajn principojn.

1. *Principo de la tempo, la spaco kaj la kulturo.* La ŝajna sama sperto povas iri de sukceso al fiasko aŭ male, kiam ĝi okazas en malsamaj lokoj, tempoj aŭ kulturoj. Pluraj esperantistoj sentas, ke ili jam trovis la bonan manieron solvi problemon. Kelkaj el ili eĉ koleras, se alia klopodas provi novan vojon, ĉar ili taksas tian klopodon naiva. Se la riskuloj tro fidas je la spertulo, plejeble ili haltos, kaj Esperantujo perdos la oportunon eble atingi bonegajn rezultojn en tiu alia loko, tempo kaj kulturo.

2. *Principo de la scienca sinteno.* Ni estas ne nur instruistoj sed ankaŭ esploristoj, ĉar ambaŭ konsistigas la karakteron de nia posteno en la plejmulto el la universitatoj. Do kial ni forĵetu aŭ forviŝu la trajton esplori, kiam ni celas sukcesigi Esperanton en la universitato? Esplori la manieron klopodi havi sukceson implicas havi planon, kolekti datumojn (kiuj estu kaj kvalitaj kaj kvantaj), analizi kaj interpreti ilin, provi ŝanĝojn ktp. Male estas supozi, ke tiu ideo, kiu venis en la kapon, tiom potenĉavas, ke ni ne bezonas esplori pri tio.

3. *Principo de la demokratiigo.* Pluraj boncerbumantaj esperantistoj pripensas, atingas bonan ideon, realigas ĝin per multe da peno, kaj faras alvokon en Esperantujo atendante pozitivajn reagojn. Plurfoje tia reago ne okazas. Se ni vere deziras partoprenon, ni alvoku homojn ne kiam jam ĉio estas decidita, sed ekde la unua momento, kiam la ideo ekiĝas. Tio ne nepre signifas sukceson, sed almenaŭ donas la oportunon riĉigi kaj adapti la projekton per aliaj boncerbumantuloj, kiuj eble ne pensas tute same.

4. *Principo de la pasio*⁵. La homoj moviĝas ĉefe pro emocioj. Tiuj novaj

⁵Pli detale en Manzano-Arrondo (2017c)

esperantistoj, kiuj ekmoviĝas, havas ideon kaj motivon, kiuj kapablas energii ilin. Plurfoje mi spertis belajn unuajn paŝojn de pasiaj aktivuloj, kiuj rapide estis malpasiigitaj pro la senutiligemo fare de spertulo, kiu alvenas kun nediskutenda sperto sur siaj manoj. Kutime novuloj estas vokataj aldoniĝi al antaŭa projekto. Kaj kutime tiu projekto ne vokas sian pasion. Rezulte ĝi restas agonianta kaj nenio nova aperas. Pli bone estus, ke oni bonvenigu la ideojn, kiuj alvenas per energio kaj pasio. Estas baterio por la movado. Pluraj fiaskos. Pluraj sukcesos. Pluraj donos rezultojn, kiujn la eksteranoj malfacile kapablos taksi. Tia estas la vivo.

5. *Principo de la sciigo.* Insulo de malgranda nombro da aktivuloj povas atingi bonajn celojn. Gravus, ke ili ĉiam sentu, ke ili regas sian projekton, kiu estas daŭre subtenata de ilia energio. Sen damaĝi tian liberecon, pli bone estas, ke insulo estu en kontakto kaj partoprenu en insularo. La bonaj decidoj baziĝas sur bonaj informoj. Sen komunikado nenio iĝas informo. Do bonvole ni ne nur sciigu al aliaj pri niaj agadoj, sed klopodu aktive partopreni en bona tutmonda reto pri agada komunikado. Potenchava insularo pli taŭgas ŝanĝi la mondon ol ununura kontinento.

6. *Principo de la ricevanto.* Mi riskas aserti, ke la plejmulto el la komunikadoj fare de la movado metas la energion en la mesaĝon. Kelkfoje la aktivuloj uzas sian propran manieron pensi kiel ekzemplon aŭ inspiron pri tio kiel ankaŭ la ceteraj homoj pensas. Ambaŭ kondutoj malfacile donas bonajn rezultojn. La sukceso de la komunikado ĉefe loĝas en la menso de la ricevantoj. Sukcesigi Esperanton en la universitato ĉefe estas tasko, kiu baziĝas sur la scio pri tio kiel funkcias la universitata institucio kaj la menso de ĝiaj loĝantoj, kerne tiuj kiuj gvidas la universitaton kiel politikistoj, aktivuloj aŭ intelektuloj. Kion ili celas? Kio kapablas movi ilin? Pri kio ili interesiĝas? Ĉu ili estas sklavoj aŭ dependas de kio? Kien ili direktas siajn okulojn? Pri kio ili fortas aŭ malfortas? Kion ili ŝatas? Kion ili timas?

Referencoj

Paulo FREIRE (1970). *Pedagogía del Oprimido*. Montevideo: Tierra Nueva.

Vicente MANZANO-ARRONDO (2015). Academia, evaluación y poder. RASE. *Revista de la Asociación de Sociología de la Educación*, 8(2), 197-222. [Universitato, taksado kaj povo]

Vicente MANZANO-ARRONDO (2017a). Lingva subpremata diskurso kaj nuntempa universitato. *Language Communication Information. Język, Komunikacja, Informacja*, 12, 121-135.

Vicente MANZANO-ARRONDO (2017b). Hacia un cambio paradigmático para la evaluación de la actividad científica en la Educación Superior. *Revista de la*

Educación Superior, 46, 1-35. DOI: <https://doi.org/10.1016/j.resu.2017.08.003>
[Celante paradigmman ŝanĝiĝon por la taksado de la scienco agado en la Supera Edukado]

Vicente MANZANO-ARRONDO (2017c) Emociaj kialoj por uzi Esperanton. *Tra la mondo*, 3, p. 64

María NOVO (2010). *Despacio, despacio. 20 razones para ir más lentos por la vida*. Barcelona: Obelisco Ediciones. [Malrapide, malrapide. 20 kialoj por pli malrapide paŝi en la vivo]

Nuccio ORDINE (2013). *La utilidad de lo inútil*, Barcelona: Acantilado. [La utileco de la malutilo]

Richard E. PETTY & Jojn T. CACIOPPO (1986). The elaboration likelihood model of persuasion. *Advances in Experimental social Psychology*, 19, 123-205. [La pripersvada modelo de la ellaborada probableco]

Jorge RIECHMANN (2003). *Tiempo para la vida. La crisis ecológica en su dimensión temporal*. Málaga: Ediciones del Genal. [Tempo por la vivo. La ekologia krizo rilate al la tempa dimensio]

Instruspertoj (Notoj okaze de vidbabilejo libera)

Dividi la sciojn kun kolegoj:

Ni esploru pri tandem-metodo.

Dum la lernata lingvo similas al la denaska, oni sentas ĝin facila.

Akuzativo en la germana ne similas al akuzativo en E-o. Knabino sukcesis en ekzerco, la patrino intervenis: „Vidu! Akuzativo en Esperanto estas kiel akuzativo en la germana!” Konsekvence la knabino metis akuzativon post la prepozicio *kontraŭ* (*gegen*, en la germana, ĉiam kun akuzativo), post la prepozicio *por* (*für* en la germana, ĉiam kun akuzativo) kaj aliaj. Por eviti tion, oni devas ege atenti uzante la gramatikajn fakvortojn kaj esprimojn, ĉar ili ofte malsamas de lingvo al lingvo.

Ĉiu studento antaŭeniras en la lernata lingvo laŭ siaj karakterizaĵoj (volo, lernemo, mensa mapo,)

Krozado sur diversaj lingvoj ebligas varmiĝon de la encerbaj tuboj kaj eroj antaŭ la serioza laboro por ellerni lingvon. Por tiu ĉi celo, multaj dokumentoj troviĝas en Esperanto, la franca kaj la angla en www.ilei.info -> Agado -> Projektoj.

Paroligi la studentojn per rolludoj povas esti riska strategio, oni devas atenti pri silentemaj homoj, timidaj studentoj; la instruisto devas havi psikologian senton.

En registraĵoj kiel filmoj, kanzonoj, kantoj k.a., oni aldonu subtekstojn, tio multe helpas al spektantaj lernantoj.

Instruado per frazaj strukturoj formulece, ekz-e: „La -o estas -a.”. aŭ „-a – o”. Rezulte, vi povas diri al lernanto: „Mankas -o por via -a!”. Kelkaj ekzemploj:

La kongreso estas interesa.

Bunta programo pli plaĉas.

Mankas tempo en mia tago.

Mankas inko en mia printilo.

Mankas mono en mia monujo. Ktp.

Ideoj naskiĝas per diskutoj: oni ne povas esti genia sola

Mirinde, kiel bone la interŝanĝo de paroloj kaj pripensoj, kune kun atenta aŭskultado al la paroloj de aliuloj, al esprimado de iliaj klarigoj pri la personaj ideoj, povas gvidi nin al fajrero pri nova plano, nova eblo, nova agado.

Diversaj fakuloj kaj altnivelaj pedagogoj jam insiste klarigas en diversaj prelegoj kaj artikoloj, ke nepras konduki niajn komencantojn plej frue al internaciaj renkontiĝoj. Tiel la komencantoj konstatas la efektivan uzon de nia lingvo, provante unue aŭskulti kaj poste ekdiskuti kun alilandanoj, kaj tiam ili travivas frustriĝon pro malaltaj lingvokapabloj; tiu negativa sento finfine donas motivaĵon al ili por pli arda kaj pli diligenta studado de la lingvo, cele al akiro de pli altaj kompetentecoj. Fali valen ekstarigas onin iri pinten.

Post la virtuala kongresa febro de junio-julio-aŭgusto 2020 ni povas lanĉi tion facile. Ni kreu borson, kie aperu prelegantoj. Iu klubo, lernejo, Eo-centro povas tie trovi taŭgan personon, rilati kun li/ŝi kaj organizi, ke tiu persono prelegu je tiu tago kaj horo, virtuale kompreneble. Tiel ni havos semadon tra la tuta jaro de diversaj prelegoj pensigaj, instruaj. Ekzemple mia listo de prelegtitoloj troviĝas en mia blogo kaj tie niaj iranaj kolegoj elektis diversajn

titolojn kaj mi ĉiun semajnon prelegis por ili (kaj ne nur por ili) tra junio 2020.

Sama sistemo povus naskiĝi kun instruistoj. Se iam en Koreio iu italo donas virtualan lecionon, tio estos evento por la koreaj gestudentoj. Se iam japana instruisto prelegas por germanoj, bonege, stimula impresio por germanaj studentoj.

Do ek al kreado de tiuj du platformoj. La retejo *eventaservo.com* funkcias pri la eventoj. Eble ĝi povus evoluigi platformon PRELEGSERVO kaj alian INSTRUSERVO. Ĉu tiuj du platformoj aperos antaŭ la jarfino? Mi esperas.

Mireille GROSJEAN



Valoro de kantado kadre de instruado

Ĉu vi emas kanti? Ĉu viaj lernantoj emas kanti? Ĉu vi volas kantigi ilin?

Mirejo enkondukas

Faciliga valoro de moviĝo, spirado, bona oksigenado de la cerbo, por pli bona lernado.

Unu el la ĉefaj valoroj de korusa kantado estas tio, ke ĉar oni ne komprenas kiu eraris, eĉ la plej timidaj homoj kuraĝiĝas ekkanti kune.

Perla Mielo aldonas: Oni ripetadas strukturojn, oni malkovras vortojn.

Pal Gajdos klarigas: En la kantoj aperas valoroj, virtoj, tio havas edukan efikon.

Mirejo kompletigas: ekzistas ankaŭ friponaj kantoj...

Pal Gajdos: li mencias la abundon de kantoj en la angla. Tio koncernas lian landon Hungario. Mirejo komentas, ke tio supozeble validas en Eŭropo, sed la usoneca muziko ne tiom abundas en Sud-Ameriko kaj en Afriko. Kie ŝi restadas en Afriko, en Benino, aperas harmonio inter la loko kaj la muziko aŭdata.

Mirejo: ŝi substrekas, ke la ligo inter la popolo kaj la folkloro malsimilas de kulturo al kulturo.

Pal Gajdos: li listigas la specojn de kantoj: folkloraj, en la loka lingvo, tradukitaj al E-o. Originalaj verkoj en E-o. Iaj kanzonoj pli-malpli tutmonde konataj tradukitaj al E-o

Komento de Katalin Kovats: Saluton, Perla parolis pri la Pirata metodo. Jen la koncerna teksto el la nova Manlibro:

3.3.8 Pirata metodo La metodo naskiĝis en Hungario en la 1980-aj jaroj. Ĝin ellaboris malgranda teamo de esperantistoj, kun la gvida rolo de Jozefo Horváth. La metodo havis du gravajn elementojn. Komence oni instruis la gramatikajn regulojn kaj en la dua etapo la kurso transformiĝis je rektmetoda kurso, kun multaj elementoj de la Cseh-metodo kaj kelkaj trajtoj de la sugestopedia aliro. La kursoj, gviditaj laŭ la Pirata metodo, estis tre intensaj, ili daŭris plenan semajnon. Por la kursosemajno la lernantoj estis komplete izolitaj de la ekstera mondo kaj estis influataj ĉiusekse kaj ĉiusekse de rektaj kaj nerektaj lingvaj informoj. La fontoj estis muraj afiŝoj, eltranĉaĵoj el gazetoj, tabeloj, recitaĵoj, spritaĵoj de la eltrovintoj, etiketoj sur mebloj, humuraj desegnaĵoj kun komentoj kaj vortklarigoj. Rekoneblas multaj elementoj de la sugestopedia metodo. La ekstreme intensa kurso postulis senliman disciplinitecon kaj alportis nekredablajn rezultojn. Por ne forgesi la rapide lernitajn erojn, la sekvintoj de la kurso membriĝis en la tielnomata Fiŝklubo, kie ili plu praktikadis la lingvon kaj formis fortan ligan inter si. Tiel solviĝis la enmovadigo. Eĉ post 40 jaroj post la unuaj kursoj la esperantistoj identigas sin en Hungario laŭ tio, ĉu ili estis fiŝoj aŭ ne.

Komento de Zsófia Kóródy: En nia ĉiusemajna klubo ni ofte kantas, ĉar tio fortigas la komunumon. La klubanoj estas plenkreskuloj, sed ili volonte kaj kantas, kaj ludas, mi antaŭe klarigas pri teksto, ludreguloj ktp. Ni elektas kantojn kun konataj melodioj, tiel ili ne devas samtempe lerni kaj tekston kaj melodion. Estas bone elekti tekston, kanton, kiu rilatas ekz. al sezono, aŭ

festoj, do elekti ilin laŭ iu temo, pri kiu oni povas ankaŭ diskuti, kaj lerni novajn vortojn.

Aliaj komentoj: Kantado kun akompana muziko pli agrablas. Por ekkanti, oni devas unue aŭdi la kanton kune kun la muziko por povi imiti la kanton kaj nepre antaŭe konatiĝi kun la teksto, la signifo de ĉiuj novaj vortoj, la ĝenerala mesaĝo de la kanto... poste oni ekkantu kune kun la muziko kaj la kantisto.

Mi ne bedaŭras la tempon de kantoj en mia klubo kiam mi komencis lerni Esperanton. Certe tio allogas min por daŭrigi lernadon. En Francio ni bonŝance povas ĥore kanti en Esperanto kaj en tre agrabla etoso, dank' al Zdravka nia sperta estrino!

Koran dankon pro belegaj folkloraj kantoj!

Sendube estas ege bona rimedo kaj pro etoso kaj pro vortoj, kiujn oni lernas. Nur malfacilas, se instruisto, same kiel mi, ne kapablas kanti.

Kantoj kaj Kajto en la instruado - konkrete en nia lernejo

de Monika MOLNAR (Hungario/Svislando)

Eble multaj el inter vi jam aŭdis pri nia lernejo „La Granda Ursino” (Ecole de La Grande Ourse), tamen por tiuj, kiuj ankoraŭ ne konas ĝin, povus esti utile scii, ke temas pri eta lernejo en la nord-okcidenta parto de Svislando, kie ĉiuj gelernantoj lernas Esperanton, kiel la unuan fremdan lingvon. Krom tiu ĉi unika eblo, mi havas ankaŭ tiun ŝancon, ke mi estas komplete libera pri la uzata metodo. Jen kial mi povis decidi antaŭ 2 jaroj instrui Esperanton al miaj progresantoj pere de kantoj. Por tiu ĉi projekto mi elektis la kantojn de la bone konata kaj vaste amata duopo, Kajto. Evidente mi havis miajn kriteriojn antaŭ la decido elekti ilin, kaj tiujn baldaŭ mi malkovros al vi.

La muziko en la lingvoinstruado por mi estas tre grava. Jam infanaĝe mi multe cerbumis pri tio, kial ni ne lernas plurajn aferojn kantante, ja kantataj konoj certege pli facile enkapigus kaj restus en la memoro pli longe. Por mi unu pruvo pri mia konvinkigo estis la televidaj reklam-filmetoj, kiujn post 2-3-foja aŭdo mi jam parkerigis, kaj multajn el ili eĉ nun mi povus laŭvorte citi. Do kial ne uzi tiun atuton en la lingvolernado? Ĝi estus samtempe kaj amuza, kaj efika maniero anstataŭ la kutimaj aliroj.

Kantado kaj lingva komunikado estas ankaŭ terenoj, kiuj povas tre harmonie kompletigi, plifortigi unu la alian, se ni atentis pri ilia ĝusta akordigo por atingi la deziratan pozitivan efikon. Tamen, la pozitivaj trajtoj de la kantoj bone ekspluateblas nur se disponeblas persona konvinkigo kaj favora sinteno de la instruisto al tiu ĉi temo kaj ankaŭ al sia grupo, ja la muziko ĉiam tuŝas sentojn, kaj bona kurento povas cirkuli nur inter homoj, kiuj respektas kaj aprezas unu la alian. Atento kaj respekto al la homaj sentoj ĉiam estas tre gravaj kriterioj en la kanto-elektado.

La muziko povas ekigi harmonion, kreas ne nur bonan, agrablan etoson, sed helpas ankaŭ riĉigi la vortrezoron, favore influas la memorkapablon, la memfidon, la disponeblon, la engrupajn solidarecon kaj respondecon, la koncentrigon, la sensomotoran kunordigon. Ĝi tre efike helpas la evoluigon de la interna aŭdo/aŭskulto, de la memoro, de la esprim-kapablo, de la inventemo kaj pere de ĝi oni povas enkonduki ekzemple interkulturajn aŭ alispecajn temojn.

Kiel jam menciite, malgraŭ la multaj pozitivaj trajtoj de la muziko, de la kantoj, dum la kanto-elektado oni devas atenti kelkajn kriteriojn por povi plene profiti el tiuj trajtoj. Do, mi menciis kelkajn el tiuj observendaj kriterioj. Tre gravas ekzemple la *vortrezoro* de la elektita kanto, ĝi devas pli-malpli kongrui kun la nivelo de la lernantoj. La *muzika stilo* estu kiel eble plej „neŭtrala”, ĝi ne sekvu iun ekstreman tendencon, krom se vi certegas ke la elektita ekstrema stilo konvenas al ĉiuj viaj kursanoj. Tio sufiĉe malprobablas, sed ne maleblas. Atentu ankaŭ pri la *tema aktualeco*, kiu povas esti teksta (ekzemple pri iu aktualajo, sezono ktp) aŭ gramatika (entenas sufiĉe abunde da ĵus lernitaj elementoj). Atenton bezonas la *neologismoj*, kiujn oni prefere bone klarigu kune kun iliaj ne-neologismaj formoj. Tre gravas la *klara prononcado de la kantistoj, kompreneblo*. Tiu ĉi kriterio estis unu el la por mi plej gravaj kriterioj por elekti la kantojn de Kajto, ja la belaj, bone kompreneblaj voĉoj de Ankie kaj Nanne absolute taŭgas por tio. Atenton meritas ankaŭ la diversnaciaj *akĉentoj*, la *proporcio inter muziko kaj kantado*, la konvena *etoso*, la *aĝo de la gelernantoj*, la *kvalito de la sonmaterialo* kaj ne laste ege gravas la *instruista sinteno al la muziko kaj kanto*, ĉar se la instruisto mem ne ŝatas la proponitajn kantojn, ili povas esti brilegaj, la instruado tamen ne estos fruktodona. Koncerne la aĝon de la gelernantoj, kantoinstruado ĝenerale tre bone funkcias en infana grupo. En grupo de junadoltaj kaj plenkreskuloj ĝi povas bone funkcii, se la partoprenantoj estas muzikamaj. Ne nepre muzikamaj, sed almenaŭ muzikamaj. La plej malfacila aĝ-grupo estas la adoleskantoj. Tie ege gravas la persona, pozitiva rilato inter la instruisto kaj la gelernantoj.

Malgraŭ la multnombraj kriterioj, oni povas kaj foje eĉ devas fari ankaŭ kompromisojn. Ekzemple oni ne nepre kondamnu taŭgegan kanton pro enŝoviĝinta erareto en la teksto. Oni povas eĉ uzi tion instrucele en la formo de iu erar-ĉasada ekzerco (atentu, ne baznivele!). Same akcepteblas kompromisoj koncerne diversajn akĉentojn, tamen atentante ke ili ne malhelpu la kompreneblon.

La kantojn oni povas envicigi en tem-kategoriojn kaj poste laŭteme elekti el ili. Sen pretendo al kompleta listo, jen kelkaj tem-kategorioj: bonvenigaj kantoj, amuzaj kantoj, amkantoj, packantoj, lulkantoj, etoskantoj, rakont-kantoj, ludeblaj kantoj, porokazaj kantoj, esperantigitaj naciaj kantoj, interkulturaj kantoj, Esperanto-kulturaj kantoj, socikulturaj kantoj ktp.

En nia nuna projekto, kiel jam menciite, ni uzas la kantojn de Kajto, sed niaj muzikaj aventuroj komenciĝis pli frue, antaŭ kelkaj jaroj, kiam kelkaj gelernantoj emis partopreni en kantokonkurso, kie estis kriterio, ke ili mem devas krei la prezentotan kanton. Estis bela aventuro, el kiu naskiĝis kvar tre belaj kantoj.

Nia „Kajto-periodo” komenciĝis antaŭ du jaroj, kaj ĉar mi instruas (ankaŭ) al adoleskantoj (memoru, la aĝgrupo, kiu estas la plej malfacila por tiaj aktivadoj!), do tre gravis la komenco, la enkonduko de tiu instrumaniero. La posta sukceso aŭ malsukceso dependis de tio. Por la komenco mi elektis la kanton „Mi memoras” kaj rakontis pri ĝia historio, ĝia aŭtenteco, kion la adoleskantoj multe aprezis kaj la temo de paco-serĉado en milita tempo tuŝis vere profunde la gelernantojn. Ili tuj ekŝatis Nanne tra liaj historio, teksto kaj muziko. Jen, kiel komenciĝis la tuto kaj kiel ĝi tuj ekhavis sukceson en mia grupo per tiu ĉi pac-kanto. Poste, krom la prilaborado de la teksto, la gelernantoj plenumis diversajn taskojn ligitajn al tiu ĉi kanto. Unu el tiuj taskoj estis fari fotojn, kiuj povus ilustri la kanton aŭ parton de ĝi. La tasko havis grandan sukceson kaj donis belajn, pripensitajn fotojn.

Alia kanto inter la unuaj estis amuza kanteto „La Tuboj”. Tie la teksto donas multe malpli da ebloj ol la ampleksa teksto de „Mi memoras”, do simple ni prilaboris ĝin alimaniere, ekzemple per ideo-asociadoj kaj ĉefe per kreado de muzik-filmeto, kiu havis enorman sukceson. Do, ĉi tie ne vere la kantoteksto pliriĉigis iliajn vortotrezorojn, sed la diversaj kreadoj ĉirkaŭ ĝi, dum kiuj ili parolis nur en Esperanto.

Por pliriĉigi la vortotrezoron, aparte taŭgas rakont-kantoj, kiel ekzemple „Kara amato de mi” aŭ „Mi estas rozo”.

Konklude, se la kondiĉoj estas favoraj al tiu ĉi instru-maniero kaj vi mem estas entuziasma kaj konvinkita pri ĝia efikeco, tiam ne hezitu, ekspluatu tiun

ĉi belegan scio-transdonon. Profitu de la pozitivaj efikoj de la kantoj kaj profitigu de ili ankaŭ la infanojn kaj la junulojn. Ne forgesu, ke ne nepre bezonatas, ke vi mem kapablu tre bone kanti, ja ekzistas nun jam multaj bonkvalitaj diskoj, kiuj estas je via dispono por tiu ĉi laboro, do ne nepras, ke vi estu kantema, sed jes ja gravas, ke vi mem estu kantama. La rezulto grandparte dependos de tio. Kuraĝu! Ek! Bonan sukceson!

Biografioj de niaj novaj Honoraj Membroj

Germain PIRLOT

El la Panteono de www.edukado.net

Germain PIRLOT (naskita la 18-an de marto 1943 en Sart-Custinne (Ardenoj, Belgio). Mezgrada lernejo, sekcio latina matematiko, en Dinant (Athénée Royal Adolphe Sax) kaj pedagogia altlernejo en Virton (1961-1963, Ecole Normale Moyenne).



En 1963-64 instruis en Bertrix (la francan, historion) kaj en Gedinne (la latinan, francan). Ekde 1966 ĝis 1997 instruis, laŭ individua sistemo, la francan, historion kaj, dum deko da jaroj, la latinan, en la franca sekcio de la liceo ĉe la Marpreventorio en De Haan-aan-Zee (ĉe la belga marbordo) kie estis zorgataj junuloj ĉefe pro astmo kaj ekzemo. Ekde 1980: trejnisto ĉe „Budo Karate Oostende” (1-a dan).

Eklernis Esperanton en 1970 per koresponda kurso. Ekde 1972 havis iajn kontaktojn kun belgaj E-medioj, sed plej ofte agado okazas ekster la landa E-strukturo, kelkfoje kun aktivuloj, kiuj pli-malpli kunlaboras laŭ siaj eblecoj.

Agadoj en instruista medio en la jaroj 1970

Kiel membro de EAI (Eŭropa Asocio de la Instruistoj – Association Européenne Des Enseignants – AEDE) kaj de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) kaj dank' al Patro Busse, EAI-anoj kaj lernejestro en Hannut, Belgio, Esperanto iĝis laborlingvo apud la franca, la germana kaj la nederlanda dum ĉiujara Eŭropa Semajno; tio okazis en Hannut kaj en

Freiburg (Germanio). Sed tio finfine fiaskis pro sektema konduto de kelkaj „samideanoj”, kiuj senĉese tedegis la aliajn partoprenantojn por esperantistigi ilin!

Post preskaŭ atentema 2-jara kontakto kun estro de eŭropa centro en Bruselo, S-ro Goovaerts, instruisto pri fremdlingvoj, eblis aperigi Esperanto-version de la bulteno „Eŭropa Dokumentaro”; poste la eldonon transprenis „Eŭropa Klubo” en Paderborn.

Laŭ peto de S-ro Kech, ataŝeo ĉe la belga franclingva Ministerio pri Edukado kaj eŭropa prezidanto de EAI, post rifuzo de la tiama ĝen. sekr. de ILEI - estis starigita traduk-reto pere de Esperanto, kun kunlaboro de E-kolegoj el kelkaj landoj, i.a. el Germanio, Grekio kaj Italio.

Pro peto de ILEI kunlabori kun EAI, estis organizata 3-taga laborkunveno en Parizo kun 4 reprezentantoj de EAI kaj 4 de ILEI (James Fairbank, Francio; Grahame Leon-Smith, Britio; Claude Piron, Svislando; Germain Pirlot, Belgio). Malgraŭ kontentigaj rezultoj, la tiama ILEI-estraro aldonis nepran kondiĉon: ke Esperanto estu LA ununura laborlingvo por ĉiuj rilatoj inter la du organizoj. Konkludo: la tuto fiaskis!

Gazetara rebat-inform-servo (1980-86)

Post timema reago de E-responsuloj al sugesto plikonigi Esperanton en ĵurnaloj denove estis persona agado por informi gazetojn pri konkretaj atingoj de Esperanto. Pro pozitivaj reagoj kaj publikigitaj leteroj, kelkaj esperantistoj proponis sin por iel kunlabori kaj estis starigita gazetara inform-reto por la franclingva gazetaro de Belgio. Sekve informoj kaj leteroj pri Esperanto multiĝis.

Rezultoj:

- Rekta intervjuo ĉe radio: RTBF (franclingva radio, Bruselo);
- Rekta intervjuo ĉe televido: RTL (franclingva televido, Luksemburgo);
- Telefona alvoko de ĉefredaktisto por prizorgi 50-linian kaj monatan kronikon pri Esperanto en la ĵurnalo „La Dernière Heure” (eld. 120 000 ekz.). Tio okazis ekde januaro 1980 ĝis decembro 1987 [sume 96 kronikoj].

Afrika kunagado (1981-1988)

Kunagado kun S-o Hans Bakker en lia rimarkinda agado en Afriko.

Al legantoj de la afrikaj revuoj franclingvaj „Bingo” kaj „Jeune Afrique”, kiuj petis korespondantojn el aliaj kontinentoj estis sendita letero (ĉ. 20

leteroj ĉiumonate), kiu atentigis pri la eblecoj de Esperanto por eksterlandaj, eksterkulturaj rilatoj, kaj kun propono sekvi senpage 10-lecionan korespond-kurson. Al tiu letero estis aldonita paĝo de pozitivaj opinioj pri Esperanto de afrikaj ambasadoroj ĉe UN en Nov-Jorko. Sen forgesi aldonon de la unua leciono de la proponita kurso; la ekzercoj devis esti senditaj al s-ro Hans Bakker, kiu resendis ilin kun laŭnecesaj korektoj kaj kun la sekvanta leciono.

Tio estis farata ekde decembro 1981 ĝis decembro 1988, kiam Hans petis ĉesigon, ĉar tio postulis pli kaj pli da tempo kaj, intertempe, kelkaj „lernantoj” komencis mem instrui Esperanton al samlandanoj kaj starigi E-movadon en sia lando.

Inform-kampanjo ĉe la eŭropaj parlamentanoj (1995-2002)

En marto 1995, post sugesto rifuzita de E-respondeculoj, estis lanĉita inform-kampanjo ĉe la eŭropaj parlamentanoj (EP-anoj) por klopodi atentigi ilin pri la eblecoj de Esperanto por plifaciligi rilatojn inter eŭropaj civitanoj. Neniam la celo estis proponi ke Esperanto estu (la) lingvo uzota en eŭropaj instancoj, kaj neniam la celo estis persvadi ilin, nur informi plej eble objektivite pri la nunaj eblecoj de la lingvo. La leteroj estis senditaj individue al la privata adreso de la EP-ano, laŭ adresaro menciita en dokumento de la eŭropaj instancoj en Bruselo. Feliĉe aktivuloj el aliaj eŭropaj landoj [tiam la Eŭropa Unio enhavis 12 landojn] ekkunlaboris; iom post iom pozitive reagis EP-anoj, kiuj konsentis eniri la liston, kiu estis sendita al ĉiuj EP-anoj post ĝisdatigo.

La situacio en decembro 1998, antaŭ eŭropa balotado, estis jena: el 626 EP-anoj 131 (aŭ 20,9%) el ĉiuj landoj kaj el ĉiuj politikaj grupoj, opiniis ke Esperanto povus iel helpi por plifaciligi kaj plirapidigi la dialogon en Eŭropa Unio, en reciproka respekto de la lingvo, de la kulturo, de la digneco de ĉiuj, apud la aliaj lingvoj. La agado devis esti relanĉita post la balotado. La lasta listo, en marto 2002 (antaŭ alia eŭropa balotado) enhavis 94 EP-anojn (15%).

Kompilado de sciigoj pri E-kursoj en universitatoj kaj altlernejoj (1977-)

Kompilado de sciigoj pri E-kursoj oficiale organizataj en universitatoj kaj altinstitucioj, kun pli-malpli regula ĝisdatigo.

1) Poŝta kompilado kun memeldono de la rezultoj en dec. 1977, jan. 1981, jan. 1982, dec. 1983, dec. 1984, jun. 1986, jun. 1988, jun. 1990, jun. 1992.

2) Reta kompilado en nov. 2002, febr. 2004, jan. 2006, jan. 2008, jan. 2010, jan. 2012, jan. 2012.

Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS)

Aniĝo en 1983 - ASci. Bac. sc. hum. - dv AdAIS SMdAIS

AdAIS: adjunkto de AIS - SMdAIS: subtena membro. Partopreno en la 4-a SUS (San-Marineca Universitata Semajno), 29.08-07.09.1987) kaj ricevo de la titolo Baccalaureatus scientiarum humanarum honoris causa.

Fondo de Premio Pirlot

Tio estas premio ĉiujare aljuĝata al la plej bona scienco (ne esperantologia aŭ interlingvistika) publikaĵo en Esperanto. La decidon pri la aljuĝo faras la Senato de AIS San Marino, kiu akceptas proponojn ĝis fino de marto de la jaro post la eldonjaro. Detalojn pri la premio, premiitoj kaj pri la kondiĉoj vidu en la aldonita PDF-dosiero.

Eldonoj

- Rigardo al Neŭtrala Moresnet - Coup d'oeil sur Moresnet Neutre, 1816-1919, memeldono, Oostende, 1987, 30 p.
- Rigardo al Neŭtrala Moresnet - Blick auf Neutral-Moresnet, 1816-1919, germana teksto prizorgita de Hildegard ZACHARIAS, memeldono, Oostende, 1990, 30 p.
- Oficiala situacio de la Esperanto-instruado en la mondo, memeldono, Oostende, januaro 1981, 10 p.
- Oficiala situacio de la Esperanto-instruado en la mondo, memeldono, Oostende, januaro 1982, 14 p.
- Oficiala situacio de la Esperanto-instruado en la mondo, memeldono, Oostende, decembro 1983, 17 p.
- Oficiala situacio de la Esperanto-instruado en la mondo, memeldono, Oostende, decembro 1984, 21 p.
- Oficiala situacio de la Esperanto-instruado en la mondo, memeldono, Oostende, junio 1986, 23 p.
- Oficiala situacio de la Esperanto-instruado en la mondo, memeldono, Oostende, junio 1988, 33 p.
- Oficiala situacio de la Esperanto-instruado en la mondo, memeldono, Oostende, junio 1990, 24 p.
- Oficiala situacio de la Esperanto-instruado en la mondo, memeldono, Oostende, junio 1992, 14 p.
- Situation officielle de l'enseignement de l'espéranto dans le monde, memeldono, Oostende, janvier 1982, 14 p.
- Situation officielle de l'enseignement de l'espéranto dans le monde, Documents sur l'Espéranto 11 F, Rotterdam 1982, 24 p., ISSN 0165-2621.

- La oficiala situacio de la Esperanto-instruado en la mondo, Esperanto-Dokumentoj 20 E, Rotterdam 1985, 32 p., ISSN 0165-2524.
- Officiële situatie van het Esperanto onderricht in de wereld, Sonorilo, Wilrijk, 1985, 36 p.
- Rim. - Versioj aperis ankaŭ en la pola (1986), en la korea (1984), en la ĉina (1981, 1987, 1989).

Traduko:

- Kiel diskonigi vian asocion, tradukita de Germain Pirlot el la franca originalo „Comment faire connaitre votre association” (Crédit Mutuel, 1984), Universala Esperanto-Asocio (Konsilaroj por Aktivuloj), 1991, 24 p.

Noto de Mireille Grosjean 2019-01-13

Germain Pirlot skribas al mi preskaŭ ĉiun tagon. Li proponas agadojn. Li lanĉas enketojn por nutri la revuon de la belga sekcio de la Asocio de Instruistoj. Sed ĉefe: li tradukas por mi ion ajn el EO al la franca aŭ inverse. Do, se bezonatas iu raporto por UNESKO, li faras tion por mi ene de 12 horoj. Tre tre valora helpo, subteno al mi.

Zlatko TIŠLJAR



Mi ja finfine dum la 60-jara pedagogia agado por Esperanto praktike ĉiam agis kiel instruisto, sed mi de komenco komprenis, ke klasika uzo de lernolibroj ne konvenas por E. Jam en sepdekaj jaroj ni havis bonŝancon en Zagrebo, kie mi gvidis IKSon (Internacia Kultura Servo), ke ni povis organizi 15 E-kursojn samtempe el elementaj lernejoj (5a kaj 6a

lernojaroj) de Esperanto. Ni havis nur unu lernolibron, tiun de Szerdahelyi. Strange ke en la unua lernojaroj la infanoj montris bonan progreson kompare kun aliaj fremdlingvoj, en la dua jaro ili ne plu progresis kaj en la tri ili eĉ stagnis kompare kun aliaj fremdlingvoj. Se estus 2-3 instruistoj, ni povus pensi, ke ili ne estas bonaj, sed 15 instruistoj ne povis ĉiuj esti malbonaj. Tial mi eksuspektis, ke la kaŭzo de malbona sukceso estas la lernolibro: uzado de lernolibro, kiu simple kopias lernolibron de iu alia fremdlingvo. Tiu, kiun ni havis, estis kopio de lernolibro de la rusa. Esperanto estas multe pli simpla

tiel, ke oni ne bezonas 50 lecionojn kune kun multegaj vortoj. Mi decidis proponi al mia profesoro, kie mi preparis diplomlaboraĵon, esplori frekvenstudon de la plej necesaj (oftaj) morfemoj. Tion oni ne povas nombri en naciaj lingvoj, sed en E eblas dispartigi ĉiujn vortojn je morfemoj kaj nombri la plej oftajn. Do, tio estis mia diplomlaboro, kaj cetere por parolata Esperanto. Mi surbendigis en infankongreseto en Lucerno (en 1979) la parolojn de infanoj, poste transskribis tion al komputila formo tiel ke mi metis minusojn inter la morfemoj de vortoj kaj fine komputilo nombris tiujn morfemojn. Kaj aperis surprizaj rezultoj: nur 480 morfemoj kovris 95% DE ĈIUJ NECESAJ morfemoj. Baze de tio nia teamo en IMS (Zagrebo), t.e. mi, Spomenka Štimec, Roger Imbert kaj kun ioma literatura helpo de Tibor Sekelj, kreis 10-lecian lernolibron laŭ la Zagreba Metodo - unue en la kroata kaj poste ĝi estis tradukita al multaj aliaj lingvoj (nun jam al pli ol 40 lingvoj). Kiam naskiĝis miaj filinoj Maja (1977) kaj Danka (1979), mi ekparolis kun ili denaske en E, kaj tiel mi lernis multon pri la maniero kiel infanoj lernas la denaskajn lingvojn.


25 jarojn pli poste Reymond Gerard kreis por mi programon, per kiu eblis en novaj komputiloj nombri morfemojn de skribitaj tekstoj en libroj, kaj tiamaj mezuradoj montris tre similajn rezultojn: malpli ol 500 plej oftaj morfemoj kovras 95% de la korpuso en Esperanto. Kaj eblis definitive konfirmi la tezon kaj elekti la plej oftajn morfemojn, per kiuj aŭtoroj de bazaj E-lernolibroj povas krei tiujn lernolibrojn kun 500 vortoj. Fine mi sukcesis konvinki mian filinon krei teamon, kiu ellaboris projekton; por financi ĝin per eŭropa mono por krei modernan retan materialon, kiu estos enkonduko al ĝenerala kono de fremdlingvoj kaj rapidigos lernadon de fremdlingvoj, se oni lernos unue tian antaŭ-objekton.

Ĉar mi komprenis, ke simple ne estas matura tempo por komprenigi al lernejoj, unue lerni E-n, ni do havas Multlingvan Akcelilon.

Esperanto en maŝin-ŝipkonstrua lernejo en Rijeka

Tiu ĉi rakonto gvidas nin al **Rijeka**, Kroatio, al Maŝin-ŝipkonstrua lernejo por industriaj kaj metiaj profesioj, fondita en 1948 por subteni la militite detruitan industrion de **Rijeka**. El ĝi eliris miloj da bonegaj maŝinistoj, ŝipkonstruistoj kaj ĉarpentistoj. La lernejo plurfoje translokiĝis kaj nun ĝi estas en la strato Jože Vlahović 10, proksime de la iamaj industriaj gigantoj de Rijeka *Torpedo* kaj *3. maj*.

La lerneja biblioteko kun pli ol 8,5 mil libroj troviĝas en la dua etaĝo de la okcidenta alo de la granda lerneja konstruaĵo, unu el la unuaj postmilitaj celkonscie konstruitaj lernejoj en **Rijeka**. La lerneja bibliotekstino jam pli ol 35 jarojn flegas la tradicion de starigo de ekspozicioj kaj ili fariĝis ero de multaj lernejaj projektoj, interalie de la Tago de la Memoro pri la Viktimoj de Holokaŭsto, al kiu estas omaĝate la 27-an de januaro. Ĉi-jare tiu jam tradicia projekto estis realigita en du partoj: *Memoroj pri Holokaŭsto* kaj *Esperantistoj en Holokaŭsto*.



Ĉar L.L. **Zamenhof**, la patro de Esperanto, estis judo, en Holokaŭsto pereis ĉiuj liaj infanoj kaj multaj aliaj parencoj. Tial ĉi-jare la lerneja bibliotekistino d-rino pri scienco **Karmen Delaĉ-Petković** okazigis ekspozicion honore al **Zamenhof**. Sur kvin grandaj tabuloj ŝi klarigis al la lernantoj, kio estas Esperanto, kiaj estas ĝiaj meritoj por la homaro, kiel kaj kial pereis la familio de **Zamenhof**. Estis prezentita la historio de la Esperanto-Movado kun akcentoj pri **Rijeka**. Sur la lasta tabulo ŝi prezentis, ke en Esperanto estas priskribablaj la plej komplikaj tekstoj kaj prezentis enkondukon al Esperanto, taŭgan por mezlernejanaj. La titolo de la ekspozicio estis *Esperanto ne estas nur lingvo*, kontraŭstarigante la ideon pri

la lingvo kiel ponton inter la popoloj al la terura genocido, kiu dum la Dua mondmilito detruis **Eŭropon**.

La ideo de la ekspozicio estis direkti la pensadon al bono kaj ĝia realiĝo en **Rijeka, Kroatio** kaj la mondo.

Ĉar la projekto estis tre vaste konceptita, la preparoj komenciĝis en decembro 2019. Kolektante la materialojn, la aŭtorino kunlaboris kun multaj kroataj esperantistoj, kiuj montriĝis tre helpemaj. Ŝi vizitis Esperanto-Societon de **Rijeka** kaj **Kroatan Esperanto-Ligon** en **Zagrebo**. Ŝi dankemas al gesinjoroj **Spomenka Ŝtimec (Zagrebo)**, **Davor Klobuĉar (Osijek)**, **Goran Krapić (Rijeka)** kaj **Esperanto-Societo de Rijeka** kun la prezidanto **Boris Di Costanzo**. Ili ĉiuj helpis ŝin per literaturo, konsiloj, tradukoj kaj per amikumado, dum kiuj ŝi multon novan lernis pri Esperanto.

La esperantistoj de **Rijeka** invitis lernantojn, la bibliotekistino kondukis en la 10a de februaro 2020 la lernantojn de la dua D klaso, membrojn de la Biblioteka Sekcio al la ejoj de la klubo en Str. Blaž Polić. La lernantoj estis entuziasmaj pri la varma akcepto fare de kvar grandaĝaj esperantistoj. Ili rakontis pri la historio de Esperanto en **Rijeka**, pri la historio de la klubo, respondadis al multaj demandoj kaj donis motivon al ili lerni unu novan, interesan lingvon.

*La vizito finiĝis per viglaj
interparoloj, al kiuj aldoniĝis
kukoj.*

Por ligi la lernantojn de la Ŝipkonstrua lernejo kun aliaj junaj esperantistoj el **Rijeka**, d-rino **Delaĉ-Petković** organizis la 25an de februaro 2020 viziton de



lernantoj el la gimnazio **Andrija Mohoroviĉić** al la ekspozicio *Esperanto ne estas nur lingvo*. Alvenis la lernantoj-membroj de la *Klubo de lingvoŝatantoj*, filma kaj videa grupo, gvidataj de instruistoj **Goran Krapić** kaj **Biljana Valentin-Ban**. Aliĝis ankaŭ **Boris Di Costanzo**. La gimnazianoj vizitis la ekspozicion kaj la lernejan bibliotekon, filmis kaj prezentis sian filmon en la lerneja retejo. Sed kio pli gravis, estis amikumado kun samaĝuloj kaj esperantistoj, kaj kompreno ke Esperanto estas en la fundamento de nova, pli tolerema socio.

Oni planis, ke lernantoj de Maŝin-ŝipkonstrua lernejo starigu etan ekspozicion de siaj fotoj faritaj dum la daŭro de la projekto kaj komencu lerni Esperanton. Estis plano prezenti la ekspozicion *Esperanto ne estas nur lingvo* en **Zagrebo**. Sed la epidemio de kronviruso kaj la detrua tertremo prokrastis la planojn al aŭtuno. Tiam la ĉi-jara projekto la *Tago de la Memoro pri la Viktimoj de Holokaŭsto* fine estos kompletigita.

*Verkis: d-rino sc. Karmen DELAČ-PETKOVIĆ
Esperantigis: Spomenka ŠTIMEC*

Babiligilo



Tiu vorto estus ia traduko el la franca lingvo „causeuse” por tia seĝo. Alia vorto estas „confident”, tio estas persono, al kiu vi en plena fido povus ĉion rakonti. Alia vorto estas „vis-à-vis”, tio estas vidalvideseĝo. Mi povas imagi, ke en diversaj lingvoj ekzistas plej amuzaj vortoj.

Ekzistas tiaj duoblaj foteloj aŭ tiaj benkoj. Sed plej simple oni kreu tion

uzante du seĝojn.

Se vi organizas babilrondon, se en lingvokurso vi donas ian taskon solvendan duope, nepre uzu tiun sidmanieron. Jen la avantaĝoj! Unue la distanco inter la du personoj estas tre agrabla kaj konvena. Ni en Svislando kutimas paroli en distanco de longeco de brako. Tion oni povas observi sur la foto. Due la du personoj rigardas unu la alian. Trie ĉiu persono sidas komforte, ĉar estas loko por kruroj, eĉ por longaj kruroj.

Se vi observas la benkojn en iuj parkoj, vi tuj povas konstati, ke homoj ne nepre parolas unu kun la alia, ĉar la vizaĝoj rigardas paralele en la sama direkto. Tiel konversacio ne nepre ekas.

Mireille GROSJEAN

Anoncoj

En la retejo de ILEI ni aperigis la solvojn de tiuj ludoj / kvizoj / krucenigmoj, kiuj aperis en la pli fruaj numeroj de IPR. Jen la alirvojo al la solvoj: https://www.ilei.info/novajxoj/SOLVOJde_ludoj_de_4_IPR.pdf

La nova eldono de la *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*, **PIV 2020**, estas finfine presita kaj estos baldaŭ mendebla (eble post kelkaj semajnoj). Sed la interreta versio de PIV 2020 estas jam nun publike alirebla, ekde hodiaŭ.

PIV 2020 loĝas nun provizore ĉe la adreso bertilow.com/vortaro.net/. Sed iam poste ĝi estos ĉe vortaro.net, kie nun troviĝas PIV 2005.

La nova serĉilo de PIV 2020 estas plene reprogramita kaj proponas multe pli da ebloj ol la malnova ĉe *vortaro.net*. Ĉiuj novaj funkcioj estas detale prezentitaj en la sekcio „Klarigoj”.

Fonto: <https://bertilow.com/bertiloblogo/?p=340>

Instruistoj de bazlernejoj estas kore invitataj esplori novan ilon por tutmonda komunikado per Esperanto. Ni invitas ankaŭ helpantojn, ĉar iam instruistoj mem ne povas fari ĉion. Teame ni povas fari pli:

<https://www.facebook.com/groups/332584984792793/>

Penny VOS, kaj 25 novaj membroj de Empatico per Esperanto

El la landoj kaj sekcioj

Argentino



Forpasis en Argentino, TERESITA INES ALANIS (1946-2020) esperantistino konata enlande kaj ĉe UEA-ILEI.

Kiel koncertistino, ŝi multfoje partoprenis en Universalaj Kongresoj kaj multon laboris en naciaj asocioj por la disvastigo kaj instruado de Esperanto.

Ŝi restos memorinda samideanino por la kolegoj kaj gelernantoj ĉe Argentina E-Ligo (AEL), kaj Bonaera E-Asocio (BEA).

Pacon al ŝi kaj niaj kondolencoj al la karega edzo esperantista GUSTAVO TOMAS kaj parencoj.

Ĉinio

Finiĝis reta E-kurso por publiko en Ĉinio

La reta Eo-kurso por la ĉina publiko komenciĝis la 17-an de marto kaj finiĝis la 11-an de aŭgusto, en la daŭro de kvin monatoj, dank' al la persisteco de kaj la instruisto kaj la kursanoj.

Pro la pandemio, ĉia eksterdoma amasiĝa aktivado ne estas permesita ekde februaro, do multaj homoj devige restis hejme kaj provis ion lerni. S-ino Wang el Pekino ofte organizas prezentadon de modelinoj kaj havas grandan amik-rondon; tiuj homoj estas emeritaj kaj aĝas pli ol 50 jarojn. Ŝi mem lernis nian lingvon en la 1980-aj jaroj kaj revenis al Esperantujo antaŭ unu jaro. Informite, ke profesorino Gong Xiaofeng (Arko) instruas Esperanton, ŝi telefone petis ŝin instrui Esperanton al ŝiaj geamikoj en interreto.



Fakte, frekventis la kurson ne nur ŝiaj geamikoj, sed ankaŭ lernantoj el la tuta lando. Inter ili troviĝas kelkaj veteranaj esperantistoj, emeritaj universitataj profesoroj, komencintoj, eĉ junuloj kaj studentoj. La kurso daŭris 1,5 horojn ĉiumarde posttagmeze. Ĉiufoje, ĝenerale 12-60 partoprenantoj vizitis la kurson. Oni povas ree spekti ĉiujn klas-sesiojn, kiuj aperas en la programo kiel „spektaĵo” iam ajn poste en la platformo, kaj laŭ la statistikoj ili jam respektiĝis 1300 fojojn.

(raportis Arko)

Germanio

„Pionira” Esperanto-kurso en Frankfurto

La kronviroza krizo havis ankaŭ grandan influon al organizado de lingvokursoj, kaj do precipe ankaŭ al organizado de ĉeestaj Esperanto-kursoj por komencantoj. La popola altlernejo de Frankfurto ĉe Majno ekzemple planis okazigi la kurson „Enkonduko en Esperanton” la 16-an de majo. Jam relative frue aliĝis ses interesiĝantoj, sed meze de marto la registaro de Hesio decidis nuligi okazigadon de ĉiuj ĉeestaj kursoj pro la kronviruso. Fine de aprilo ankoraŭ ne klaris, ekde kiam ĉeestaj kursoj denove eblos; la popola altlernejo do havis la eblon aŭ nuligi ĉiujn planitajn kursojn, aŭ simple enretigi ilin. Oni fine decidis okazigi sian kurson rete, perhelpe de speciala softvara programo, evoluigita speciale por edukoceloj. Nun oni ankoraŭ bezonis iun „pioniron” - do kurson, kies kursestro kuraĝus proponi retkurson per tiu (komence ja iomete komplika, sed tamen efika) programo. Por kuraĝigi la kursestrojn la popola altlernejo okazigis plurajn pliklerigajn sesiojn por la interesiĝantaj kursestroj. Fine mi, do la kursestro de „Enkonduko en Esperanton”, ekkuraĝis kiel la unua kaj Esperanto fariĝis pioniro: kiel la unua, plene pagenda retkurso en la historio de la popola altlernejo de Frankfurto ĉe Majno ĝi okazis regule ekde la 16-a de majo, sed rete. Ĝia organizo estis iomete alia ol organizo de „analogaj” kurso, interalie, ĉar la maleblo de persona interagado postulis la evoluigon de novaj alirmetodoj: la gramatikon mi klarigis perhelpe de prezentado, la partoprenantoj respondis al demandoj per virtualaj „kartoj” metendaj sur virtualan tablon, kaj por ĝeneralaj demandoj pri Esperanto kaj ĝia movado kaj kulturo mi uzis enketojn. Kiel observantino partoprenis ankaŭ la gvidantino de la lingva fakultato de la altlernejo, kiu tiamaniere ankaŭ iomete lernis Esperanton. La kurso fariĝis granda sukceso kaj ĝia organizado nun servas kiel modelo por aliaj retaj lingvokursoj, interalie pri la angla, hispana kaj franca lingvoj. Krome la kurso preparis kelkajn el la partoprenantoj por okazonta fine de novembro (ĉeesta) tutsemajna kurso „Bildungsurlaub Esperanto”: kurso kun ŝtata edukforpermeso, kies enhavo estos je 75% la lernado de Esperanto, kaj je 25% instruado pri la historio kaj kulturo de Esperanto. Ĝi estos la unua tia kurso en Hesio.



Martin PTASINSKI

Hungario

Ŝanĝo en la lingvoekzamenaj postuloj en Hungario kaj iliaj sekvoj

Dum la pandemio, en Hungario naskiĝis nova leĝo, kiu grave tuŝas la instruadon de Esperanto. Inter 1996 kaj 2020 ĉiu, kiu volis havi diplomon pri superaj studoj devis sukcesi en lingvoekzameno. La universitatoj mem rajtis difini kiujn lingvojn ili akceptas, kiagradan lingvoekzamenon ili postulas, ĉu necesas ekzameno pri unu lingvo aŭ eĉ pri du.

Per tiu decido la ŝtato volis instigi la studentojn al lingvolernado. Ja en eŭrope-skalaj komparoj la lingvoscio de hungaroj estas mizera.

Tamen montriĝis grava problemo. La hungara lingvo ne apartenas al la hindeŭropa lingvaro. Hungaroj ofte fieras pri tio, kiom malfacila estas nia lingvo por eksterlandanoj, sed la afero funkcias ankaŭ en la alia direkto. Por multaj hungaroj estas tre malfacile alproprigi fremdan lingvon.

Rezulto? 20-22%-oj de la studentoj finis sian studadon, faris sian faklaboraĵon kaj ŝtatekzamenon, sed ne povis transpreni sian diplomon pro la manko de lingvoekzameno. La diplomo per fakvorto „algluiĝis” al la universitato, ĝi fariĝis netransdonebla.

En tiu situacio helpis Esperanto. La studentoj rapide rimarkis, ke Esperanto estas pli facila, pli rapide lernebla ol aliaj lingvoj kaj eblas fari lingvoekzamenon pri ĝi (ekde 1966). Komenciĝis flora epoko en Esperanto-instruado. Tamen nur 30%-oj de la kandidatoj sukcesis en la lingvoekzamenoj. La studentoj volis rapidan rezulton kaj ili dediĉis tro malmultan tempon por la lernado. La 2-3-monataj, ĉ. 100-horaj kursoj ne estis sufiĉe efikaj.

En la decembra numero de la revuo *Esperanto* en 2010 Ivano Bujdosó aperigis statistikojn, laŭ kiuj inter la jaroj 2001 kaj 2009 trapasis sukcese lingvoekzamenon pri Esperanto ĉ. **25 000** personoj. En la lasta jardeko la nombro de kandidatoj pograde malmultiĝis, ja pluraj universitatoj forigis el la akcepteblaj lingvoj Esperanton.

Tamen la nombro de sukcesaj ekzamenintoj inter 2011 kaj 2019 estis ĉ. **11 500** personoj. En la lasta jaro ni havis 1861 kandidatojn el kiuj sukcese trapasis la lingvoekzamenon 740 (statistikojn pri lingvoekzamenoj vi povas vidi ĉe <https://nyak.oh.gov.hu/>).

Esperanto estis dum tiuj 24 jaroj la tria plej ofte lernata lingvo en Hungario. En 2019 anonciĝis por lingvoekzameno pri la angla 94 147, pri la germana

21 925, pri Esperanto 1.861, pri la lovara (lingvo de romaoj/ciganoj) 1 412, pri la franca 1 403, pri la hispana 1 254, pri la itala 987, pri la rusa (dum jardekoj la sole lernebla fremda lingvo) 548 personoj.

En la ekzamena centro ELTE ONYC, kiu organizas ankaŭ la internaciajn KER-ekzamenojn, Esperanto estis aparte grava, ĉar pri aliaj lingvoj eblas fari lingvoekzamenon en amaso da lokoj, sed pri Esperanto nur ĉi tie. Sekve la nombro de niaj kandidatoj tre similis al tiu de la germana lingvo, foje eĉ superis ĝin.

Dum la pandemio la organizado de lingvoekzamenoj fariĝis dum certa tempo malebla. La lingvoekzamenoj dum marto kaj aprilo ne okazis. La universitatoj estis fermitaj. La registaro decidis, ke ricevu sian diplomon sen lingvoekzameno ĉiu, kiu faris/faros sian ŝtatekzamenon ĝis la 31-a de aŭgusto. Tio signifas, ke la grandega amaso da netransprenitaj diplomoj fariĝis transpreneblaj. La decido tuŝas 75 000 homojn, kiuj kun sia diplomo finfine povos eklabori en sia fako aŭ ricevi pli altajn postenojn kaj salajron.

Se oni pensas pri la homoj, kiuj apud laboro kaj familio, universitata studado, dum la vesperaj horoj aŭ semajnfinoj penis lerni lingvon sen granda sukceso, kaj sen multa espero, tiam ni povas ĝoji. Esperanto ne povis helpi al ĉiu, sed tamen helpis en tiu 24-jara periodo al ĉirkaŭ 36.500 personoj.

Granda malsukceso de la hungara Esperanta movado estas, ke el tiu amaso da homoj preskaŭ neniu poste ekuzis la lingvon aktive, ja ili lernis ĝin nur por la diplomo, kaj atinginte sian celon, rapide forgesis ĝin. La nuna decido de la ŝtato estas helpo por la studentoj, sed samtempe bato por la lingvoinstruistoj. Ja grava motivo por la lingvolernado malaperis. Por la junia lingvoekzameno pri Esperanto anoncis sin 220 personoj, el kiuj restis 35. Por septembro anoncis sin nur 39 personoj.

Ĉiuj esperoj ne estas perditaj: la gimnazianoj povas akiri plusajn poentojn per lingvoekzameno dum la priakceptaj ekzamenoj. La gejunuloj, kiuj diplomiĝos post la 31-a de aŭgusto 2020, bezonos jam denove la lingvoekzamenon por sia diplomo. Tamen estas fakto, ke la lingvoscio de la nova generacio estas esence pli bona ol tiu de la mezaĝuloj, do la gejunuloj verŝajne povos trapasi sukcese ekzamenon pri la lingvoj lernataj en la mezlernejo kaj ne tiom bezonos Esperanton. En tiu nova situacio aparte gravas la internaciaj KER-ekzamenoj, por ke la estraro de ELTE ONYC vidu, ke restas ankoraŭ interesiĝo pri Esperanto.

Palma CSISZÁR-SALOMON

INFORMOJ PRI ILEI

Laborkomisionoj

Ekzamena: Karine Arakelian (prez.), Mireille Grosjean (vicprez.), Mónica Molnár, Giridhar Rao, Jérémie Sabiyumva, Han Zuwu.

Elekta: Aurora Bute (gvid.), Zsófia Kóródy, Aristophio Alves Filho.

Kontrolo: Simon Smits, Orlando Raola.

Lerneja: Julian Hernández, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Marija Jerković, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.

Regulara: Marija Belošević, Rob Moerbeek, Stefan MacGill. Estrare: M. Grosjean.

Terminara: Miroslav Malovec, Ilona Koutny. Estrare: Mireille Grosjean.

Universitata: Duncan Charters (gvid.), Renato Corsetti, Gong Xiaofeng „Arko”, Goro Kimura, Ilona Koutny, Katalin Kováts, Radojica Petrović, Kristin Tytgat, Vicente Manzano Arrondo. Estrare: Ivan Colling.

Enmovadaj partneroj (entute 14)

E@I (*Edukado ĉe Interreto*): Vítazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, info@ikso.net. Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: <http://www.ikso.net/eo/>.

Fondaĵo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj. Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74, NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando. Retadreso: redaktanto@edukado.net.

ICH (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49) 55215983, Trejnseioj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, zsafia.korody@esperanto.de.

IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio): *vd. la Jarlibron de UEA*

TEJO (<http://www.tejo.org/>): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Unika (Yuro Jung)**.
Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Karina Oliveira**.

UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, www.uea.org. Observanto de ILEI ĉe UEA: **Mireille Grosjean**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Duncan Charters**.

kaj aliaj

Ekstermovadaj partneroj (entute 8)

ALTE (*Asocio de lingvaj testistoj de Eŭropo*) Repr. de ILEI: **Zsófia Kóródy**,

FIPLV (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj*): Repr. de ILEI: **Mireille Grosjean**.

UN (kun statuso de observanto): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek, Ron Glossop, Leysester Miro**.

Unesko (kun statuso de observanto): Rerezentantoj de ILEI: **Monique Arnaud** (ĉefdelegito), Ecole Chemin de l'Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, monique.arnaud@aliceadsl.fr, **Martine Demouy, Max Demouy, Jesper Jakobsen, Josiane Moirand**

kaj aliaj

Membreco kaj pagado por diversaj servoj

Membreco kostas 20 € en A-landoj (laŭ la malnova UEA-difino), **10 € en B-landoj kaj 2 € en C-landoj**, kun ricevo de 4 numeroj de *IPR* jare. Kun aliro nur al la reta versio de *IPR* membreco kostas 10 € por la A-landoj, 5 € por la B-landoj kaj 1 € por C-landoj. Supera membro estas tiu ILEI-membro, kiu mendas paperan *IPR* kaj paperan *Juna Amiko* (JA). Tio kostas por A-landanoj 32 € kaj por B-landanoj 18 €. Abono de JA papera kostas 18 € en A-lando, 13 € en B-lando. Abono de JA reta kostas 11 € en A-lando, 7 € en B-lando. Bonvenaj estas donacoj al la kaso de ILEI kaj al la fondaĵoj de ILEI. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por JA akceptas abonojn enlande. Por informi pri viaj pagoj, bonvole skribu al Vilĉjo (Bill) HARRIS, 4 Edgcomb Ct, Portland ME 04013, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Bv klare indiki la celon de via pago. La pagoj por ILEI povas okazi a) pere de la nederlanda ILEI-banko aŭ b) pere de la ILEI-konto ĉe UEA. Jen detaloj:

a) Pagoj al la nederlanda banko de ILEI: numero 4676855 ĉe ING Bank N.V., IBAN NL55INGB 0004676855, BIC INGBNL2A. Bonvolu aldoni 5 € por la nederlandaj bankokostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo) kaj EU.

b) Pagoj al la konto de ILEI ĉe UEA: Por pagi al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, bv uzi: ING Bank, Postbus 1800. NL-1000 BV Amsterdam (konto: 37 89 64; IBAN: NL72INGB0000378964; BIC/SWIFT: INGBNL2A). Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj. Indiku vian nomon kaj vian landon, la celon de via pago kaj la konton de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Ĝiri monon el via UEA-konto al ILEI-konto ĉe UEA estas facila ago.

* Simpla abono de *IPR* sen membreco: 24 €. Reklamtarifoj por *IPR*: 180 € por plena, 110 € por duona, 70 € por kvarona paĝo. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

* ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag (NL) sub numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (NL).

* Retpaĝo de ILEI: <http://www.ilei.info>.

REDAKCIAJ INFORMOJ


Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Marc CUFFEZ, *Elisabethlaan 295, BE-8400 Oostende*. **Teknika helpo**: Stano MARČEK. **Presado**: Alfaprint, Martin, Slovakio. **Redaktoro**: NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario*, jozefo.nemeth@gmail.com, www.ilei.info/ipr/; tel: (+36-70) 931-0530.

Peranto de ILEI kadre de LIBE (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj): Olena Poshivana, amatalena@ukr.net. La revuo estas rete aŭskultebla por vid-handikapuloj. Informas: Rob MOERBEEK, *Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE BEVERWIJK, Nederlando*, moerbeekr@gmail.com.

**Ni fermis la nunan numeron la 15-an de aŭgusto 2020,
redaktifino por la sekva numero: la 31-an de oktobro 2020.**



Malferma parolo de Mireille Grosjean dum VEKI



Elena Nadikova prezentas la rusan lingvon dum VEKI

Podia diskuto pri Juna Amiko

VEKI

Mirejo

Elena Nadikova

Manuela

Stano Marček

Zsofia

18:50

VEKI

Jozefo Nemeth

ilei

REDAKTI PROFILON

Nuna programo

Gravaj anoncoj

Plena programo

Vidbabilejoj

Tekstbabilejoj

Partoprenantoj

Regularo

Instrukcioj

Pri la evento

Podia diskuto pri Internacia Pedagogia Revuo

VEKI

Mirejo

József Németh

IPR INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO 100

35:51

VEKI

BABILEJO DEMANDEJO

Gungung KIM
Saluton al cxiuj ! Dankon. Mi dankas, ke la diversaj programoj estas cxiuj detalaj kaj informaj, kaj mi ankaŭ dankas povi sidi cxi tie hejme kaj aŭskulti la prelegojn de nobeloj.